



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 3

Majo/Junio 1964

IFEF-KONGRESO EN LA BELGA METROPOLO

La 16a kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) bone sukcesis. 420 fervojistoj el 14 landoj, inter ili 60 germanoj kun siaj familianoj, venis de la 9a ĝis la 15a de majo 1964 al Bruselo. Multnombro ili partoprenis la laborkunsidojn kaj ĝuis el la riĉa kongresoprogramo la kulturajn kaj turismajn aranĝojn.

Sur la vojaĝvojo laŭlonge de la Rejno ĉie regis la sunbrila printempo. Longaj vicoj de florantaj fruktaroj defiladis. La formalajoj en la trajno por la dogana kaj pasporta kontroloj aperis bagatelaj, kaj nur la transiro de la senfinaj reloj al la breĉaj demonstris, ke oni troviĝis jam en Belgio.

Dank' al la afableco de la Belgaj Ŝtatejoj estis disponigita la Centra Stacidomo de Bruselo kiel kongresejo. Kvankam ŝajnis esti iom nekutime preterpasi la biletkontrolejon por atingi ĝin, entute tiu nobla gesto estis praktika kaj ne ŝarĝis la budĝeton de la LKK. Tie estis la kutimaj ĝiĉetoj, librejo de HEROLDO-eldonejo kaj Esperanto-ekspozicio, tie rigardis la poŝmarkkolektantoj la plej allogajn eldonaĵojn. Tie estis la scenejo por kortuŝaj rendevuoj inter longjaraj geamikoj, kaj tie oni atendis, skribis aŭ babilis.

La apudaj salonoj, same subteraj, pro kio la impresoj de kelo restis konstante, servis al la laborkunsidoj kiel ankaŭ al la interfratiĝa vespero (9. 5.). Sed montriĝis, ke por la interkonatiĝo necesas komforta apudsidejo. Du belaj filmoj donis sciindaĵojn pri lando kaj fervojo. Kiu sentis sin sufiĉe freŝa, vagis tra la centra urbo, prefere al la proksima Granda Placo, kie la orgrizaj fasadoj de luksaj renesancstilaj domoj brilis en lumo. La urbdoma turo levigis en majesta soleco al la nokta ĉielo.

Malfermo en digna kadro

Laŭtradicie la kongreso oficiale komenciĝis dimanĉmatene (10. 5.). Por tiu kunveno kiel ankaŭ por aliaj kun kultura karaktero LKK estis luinta la allogan salonegon „Patria“. Sur la scenejo prenis lokon la IFEF-estraro kaj la alparolontaj reprezentantoj. Du Esperantoflagoj signis



En la kongresejo



BEF-prezidanto Jaumotte dum la festparolado

la karakteron de la aranĝo, bedaŭrinde mankis la IFEF-flago. Post bonvenigaj salutvortoj de la BEFA-prezidanto Deduytsche direktis siajn salutojn al la kongresnaro s-ro Vanizen nome de la Belgaj Ŝtatfervojoj. Sekvis la prezidanto de FISAIC en Belgio, s-ro Jooris, dum la anoncita ĝenerala prezidanto de FISAIC, s-ro Mollion el Francio, bedaŭrinde mankis pro malsano. Krome ne ĉeestis la anoncita reprezentantino de la urbo, kio okazis la unuan fojon en la historio de IFEF. La sindikatoj estis sendintaj kiel delegitojn sian nacian sekretarion, s-ron Joyeux. Por la Fervojaj Vojaĝagentejoj salutis la kongreson la entuziasma ĝenerala prezidanto, s-ro Watterlot. Ĉiuj alparoloj estis tradukataj el la franca lingvo esperanten, samkiel tio okazis inverse en la francan kaj flandran lingvon por la sekvantaj parolantoj el la vicoj de la esperantistoj.

Sekvis la emociiga salutado flanke de la landaj delegitoj en jena sinsekvo:

Aŭstrio, Britio, Bulgario, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Svedio kaj Svislando. Ne ĉeestis la anoncitaj reprezentantoj de Ĉeĥoslovakio, Finnlando kaj Pollando.

GEFA-prezidanto Gießner, kiu salutis ankaŭ nome de la Sociala Servo (BSW), esprimis sian ĝojon esti en lando, kie pace kunvivis homoj de du lingvogrupoj, dum Germanio kun nur unu lingvo estas dispartigita de 19 jaroj. Pluajn bondezirajn transdosis s-ro Schellekens, ĉefdelegito de la Universala Esperanto-Asocio, kaj s-ro Beckers, ĝenerala prezidanto de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

IFEF-prezidanto De Jong akcentis la klopodojn kaj sukcesojn de la lastjara agado interne de la landaj asocioj. Dankante pro la bonaj preparoj, kiujn LKK faris por la kongreso, li esprimis sian deziron, ke la aranĝoj sukcesos kaj la restado en la grandioza metropolo plaĉos al la kongresanoj. Post tio li deklaris la kongreson malfermita.

La scenego mallumiĝis. Antaŭ la ruĝa kurteno ekbrilis la impona instrumento de ora harpeno. La unuaj tonoj perlis tra la salonego. Blonda anĝelsimila harpenistino ravis per la forto de sia kapableco kaj instrumento. Estis vera ĝuo, unika kiel interludo okaze de kongresmalfermo. Ne mirinde, ke la muzikistino ricevis longdaŭran aplaŭdon.

La festparolado

La solenaĵo atingis sian kulminon, kiam la prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio, s-ro Jaumotte, per sia elokventeco kaptis la atenton de la aŭskultantoj. Oni ne plu parolas, diris la oratoro, pri la interna ideo de Zamenhof, ĉar la ekstera utilo de la internacia lingvo estas pli evidenta. Sed ĉu ne ankaŭ la fervojoj bezonas pli multon ol nur la teknikan aparaton kaj la necesan personaron? Sen la konvinko de la fervojistoj, ke ilia laboro bazas ankaŭ sur homaj idealoj, ke fakte la reloj interligas la landojn, ĉiuj klopodoj aperas vanaj kaj senfruktaj. La modelo de la profesia idealismo kondukas al la konsekvenco, ke la Esperantismo ne estas nur lingvista, nur ekonomie utiligebla, sed por la vera interkompreniĝo ĝi estas necesa kaj fruktedona por la homaro. Preĉipe la fervojistoj, kies profesio elstaras pro sia internacia karaktero, sentu sin komisiitaj agadi pli aktive ol la plimulto de la esperantistoj. La aŭskultintoj longe aplaŭdis. Sen la himno finiĝis la malfermo, kio pro manka orkestro ne estis tre bedaŭrinda.

Kunsido de la redaktoroj

Tagmeze (9. 5.) LKK kaj IFEF-estraro havas sian kunsidon. Posttagmeze sekvis la redaktoroj de la naciaj organoj. Paroli pri laboro estus troigo. Ĉar nek sentis sin la redaktoroj devigataj raporti el sia medio nek okazis dezirinda interŝanĝo de spertoj kaj instigoj. Ne povis esti la senco de tiu kunveno, ke la redaktoro de la IFEF-organo „La Internacia Fervojisto“, s-ro Burgler, (Nederlando), esploris, ĉu sia laboro entute kontentigis dum la lastaj 12 monatoj, kiam li transprenis tiun postenon. Cetero la gremio de la redaktoroj povis tion konfirmi al li. IFEF-prezidanto De Jong kuraĝigis la ĉeestantojn daŭrigi tiujn altvaloraĵojn kaj dum la tuta jaro farendajn taskojn. Oni devas demandi sin, ĉu la laborkunsido de la redaktoroj bezonos alian bazon rilate tagordon kaj kunlaboron. En sia nuna formo ĝi ne kontentigis des pli multe, ĉar kelkaj landoj ne estis reprezentitaj resp. sendis iun nefakan anstataŭilon.

Terminara laboro pligrandiĝis

Same jam sabaton (9. 5.) kunsidis la terminaraj fakuloj el kvin landoj. La kunlaborantoj el la ceteraj landoj ne jam estis alvenintaj. Espereble tiu malkonvena fiksado de la tempo ne plu ripetigos. La gvidanto de la terminara komitato, s-ro Ritterspach (Germanio), informis, ke „Esperanto-press“ en Kanado decidis eldoni esperantlingve la „DUDEN-Bildvortaron“. El pluraj centoj da bildtabuloj de tiu vortaro 11 koncernas la fervojojn. Volenevole oni devas partopreni tiun traduklaboron por eviti, ke estos publikigitaj malsamaj tradukoj pri la samaj objektoj flanke de la „Esperanto-press“ kaj la Terminara Komitato. Tiu nova tasko rezultigis stagnon por la cetera laboro, sed rifuzi la kunlaboron certe estus la pli granda malavantaĝo.

Post raportoj pri la terminara laboro en la landaj asocioj leviĝis la demando, ĉu la eldono de poŝformata fervoja terminareto estas rekomendinda. La diskuto kondukis al la aprobo, eĉ se la proksimuma enhavo estos nur 2 mil vortoj.

Komitato donis direktivojn

Dufoje je la sama tago (11. 5.) kunvenis nepublike la IFEF-estraro (ekzekutivo) kaj la komitato (legislativo). Kiel konate funkcias ekde unu jaro anstataŭ la delegitaro la komitato. La voĉraĵo transiris al nomigitaj personoj kies nombro dependas de la pagitaj IFEF-kotizoj. GEFA estis reprezentata per kvar komitatanoj. Dum la lasta IFEF-kongreso oni estis fondinta specialan komisionon, kies tasko estis elabori la modifendajn artikolojn de la regularo. Evidentiĝis post unu jaro, ke la seskapa komisiono ne povis prezenti unuecan novan regularon resp. statuton. S-ro Walder (Svislando), la estro de tiu komisiono, klarigis la ekzistantajn tri projektojn: tiu de s-ro Blondeaux (Francio) estis ampleksa kaj en sia formo simila al tiu de UEA, tiu de s-ro Barnickel (Germanio) tre akcentis la administran funkcion, dum la propra projekto de li mem (Walder) bazis sur la nuntempa regularo. La opinioj diversaj estis atingintaj staton, kie nur novaj direktivoj de la komitato povis preskribi la irotan vojon. La komitato donis la novajn direktivojn. Ĝi konsentis la alekton de kromaj komitatanoj kun voĉdonrajto. Ekz. la ĝisnuna komisiito por junularaj aferoj fariĝos komitatano. La komitato ricevos afergvidanton nomitan „ĉefkomitatano“. La loĝloko de la IFEF-prezidanto fariĝos la jura sidejo. La IFEF-redaktoro plue apartenos al la IFEF-estraro. La posteno de asoro transformiĝos en vicprezidanton. IFEF-prezidanto substrekiis la plivastigitajn taskojn de la persone

respondecaj komitatanoj kaj esperis, ke IFEF ankaŭ dum la tuta jaro povos funkcii helpe de siaj organoj — estraro kaj komitato —, ke la junularo ricevos konkretan voĉdonrajton kaj la problemoj de la posteuloj harmonie solviĝos. Li petis la statutkomisionon prezenti post unu jaro nur unu projekton de nova statuto.

Dum la libera diskuto s-ro Gießner kiel komisiito por fakpreleĝoj klarigis ankoraŭfoje sian projekton de kroma fakpreleĝo.

La junularaj problemoj

estis la objekto de du laborkunsidoj. La estraranoj preparolis siajn spertojn kaj demandojn en interna kunsido (9. 5.), dum la junulara forumo (13. 5.) esploris la plej taŭgajn metodojn por interesiĝi la junularon pri Esperanto. En ĉiu lando la situacio estas alia. Leviĝis la demando, ĉu oni serĉu vojojn por la amaso aŭ por malgranda elito. La diskutado kondukis al la rekomendo, ke malgraŭ diversaj malavantaĝoj estas preferinde vekti la intereson en la amaso fidante ke inter ĝi troviĝos ankaŭ la serĉotaj esperantistoj. La deziro havi voĉdonrajtan komitatanojn por junularaj aferoj post principa konsento de la komitato realiĝos en la nova statuto.

Pozitivaj rezultoj de la laborkunsidoj

En du publikaj laborkunsidoj la kongresanaro trovis okazon informi sin pri la aktualaj problemoj de la federacio. Ambaŭ kunsidoj (13. kaj 14. 5.) estis sufiĉe frekventitaj de aŭskultantoj, sed mankis diskutantoj, kiuj ne apartenas al la komitato. GEFA ĝojas, ke el la propraj vicoj venis sufiĉe da interesuloj. IFEF-prezidanto De Jong donis superrigardon pri la ne malgranda agado de la estraro dum la pasinta jaro. IFEF havas nun 2500 pagantajn membrojn. Kredeble ankaŭ en Ĉeĥoslovakio fondiĝos landa asocio. La estraro partoprenis diversajn jarkunvenojn, inter ili tiun de GEFA en Regenburburg, internaciajn kongresojn kaj feriejojn. Kun granda kontenteco ĝi agnoskis la sukcesojn de la landaj asocioj. Post nelonge ankaŭ la hispanaj fervojoj esperantigos parton el la horara teksto. La klopodoj de la aŭstraj kolegoj akiri ĝeneralan konsenton de la fervojaj administracioj bedaŭrinde ne sukcesis. Tamen la horarkonferenco 1963 en Sofio, la plej alta instanco de la fervojoj, kiu okupiĝis oficiale pri tiu propono, lasis la decidon al la koncernaj fervojoj, tiel ke almenaŭ ne ĝenerala malkonsento regas pri tiu problemoj. Je la honoro pri la intertempe mortintaj IFEF-membroj la ĉeestantoj levis sin de siaj lokoj.

La diskuto vigliĝis pro la raportoj pri la lastjara kongreso kaj pri la sekretaria laboro. Oni plendis pro malprecizeco de la nomoj, mankaj eventoj kaj precipe pri la nekontentigaj interrilatoj kun UEA. Tio montriĝis ĉefe en la mankaj jarraportoj de IFEF dum la lastaj tri jaroj en la jarlibro de UEA. IFEF-prezidanto De Jong promesis helpon en la kritikindaj kazoj, sed rifuzis entute, ke IFEF kiel memstara organizaĵo tiel aktive okupiĝu pri UEA-aferoj. Laŭ lia opinio oni ne povas limigi la nombron de la estraranoj kaj postuli pli grandan aktivecon. La kasista raporto trovis pli pozitivan reagon. Konsiderante ke la plej granda parto de la enspezoj estis konsumataj por la IFEF-organo, la aliaj elspezoj aspektis modestaj. La unua labor-kunsido finiĝis per la raportoj de la gvidantoj de la fakaj kunvenoj.

Ankaŭ en la dua publika laborkunsido ne mankis aktualaj organizaĵaj problemoj. La IFEF-prezidanto ankoraŭfoje klarigis sencon kaj utilon de la instalita komitato. Komenciĝis la proceduro de la baloto. La komitatanoj elektis skribe kaj sekrete la novan IFEF-estraron. Ili devis observi unuafoje la ŝanĝitajn artikolojn de la regularo, laŭ kiuj nur la nomigitaj komitatanoj resp. la skribe delegitaj anstataŭuloj havas voĉdonrajton. Pro tio du landaj asocioj ne rajtis partopreni. La rezultato de la baloto estis jena:

- prezidanto: De Jong (Nederlando)
- vicprezidanto: Walder (Svislando)
- sekretario: Poptie (Nederlando)
- kasisto: Oosterwijk (Nederlando)
- redaktoro: Burgler (Nederlando)

Por tute korekta proceduro estus dezirinde, ke la IFEF-prezidanto transdonos la baloton al la ĉefkomitatano.

Post 16 jaroj la estraro unuafoje konsistas el personoj de du landoj, kio estas principe dezirinda. Aliflanke la funkcio de s-ro Lok definitive finiĝis, kion oni bedaŭris ĝenerale. Li apartenis al la fondintoj de IFEF kaj povas esti taksata kiel la koro de la movado dum multaj jaroj. Li laboris bonege kun la estraro de GEFA.

El la kongresproponoj tiu pri la altigo de la IFEF-kotizo de 1,50 al 2,50 nedl. guld. vekis la antaŭviditan reagon. Sed, ĉar la motivoj por la altigo similas al tiuj interne de UEA aŭ GEA, sufiĉas raporti, ke kun iom da plimulto la propono pri la altigo estas akceptita. La proponoj de Danlando starigi „lokajn reprezentantojn“ kaj „korespondantgvidanton“ ne trovis la aprobon, cetere ili ne estis novaj. Por la franca propono forsendi la IFEF-organon individue rezultigis kompromiso, kiu koncernos nur interesgotajn landajn asociojn. Du polaj proponoj rilatis ellaboratajn artikolojn

de la nova statuto. Ili povis esti transdonataj al la statutrevizia komisiono.

La kaskontrola komitato konsistis el la s-roj van Leeuwn, Becker kaj Vermaak. Konflikta komitato ne plu ekzistis. La estonta statuto antaŭvidos alian traktadon.

La reprezentanto el Norvegio kore invitis ĉiujn partopreni la 17an IFEF-kongreson en Hamar (Norvegio). Por 1966 ankoraŭ ne estas fiksita definitiva kongresloko. Nederlando invitis al Utreĥt. Eble la 18a IFEF-kongreso okazos ankaŭ en orienta lando por kreskigi la reputacion de la tieaj landaj asocioj. Post diskuto, kiamaniere la landaj asocioj povas ekzameni la lingvan kapablecon de la kongresanoj, kaj post dankvortoj por la eksiganta estraro Lok finiĝis tiu entute harmonia kaj fruktedona laborkunsido.

Fakprelego pri elektroniko

La gastiganta lando estis elektinta por sia fakprelego (14. 5.) la sendube eksterordinaran temon „La apliko de la elektroniko ĉe la Nacia Societo de la Belgaj Fervojoj“. Enkonduke al tiu prelego s-ro Gießner (Germanio), la gvidante de la fakprelega komitato, akcentis la valoron kaj necescon eluzi la elstarajn eblojn de Esperanto por fakaj celoj. La nivelo pliboniĝis de jaro al jaro. Kelkaj fervojaj administracioj ekz. la Germana Federacia Fervojo envicigis la fakan prelegon en sian dokumentan servon. Antaŭkondiĉo estas serioza ellaborado de kompetentulo. Tiun jaron estis la verkinto s-ro Hendrickx, organizadkonsilisto en la ĝeneraldirekcio de la Belgaj Fervojoj. Niaj legantoj trovos la kompletan tekston en la venonta eldono de la internacia organo. Germanlingva resumo



Preparoj por la Kongresfoto

estas presita sur paĝo 7. La prelego estis kompletigata per lumbildoj. Krome oni montris kolorfilmon pri la funkcio de la Belgaj Fervojoj. La intereso pri tiu arango estis laŭdinda kaj demonstrigis per bona vizito.



Kongresanoj antaŭ la ATOMIUM-konstruaĵo

Bruselo — tro granda

Kiel mirinda urbo estas la belga metropolo, spertis la kongresanoj dum unu semajno. Ili partoprenis la ĉiutagan vivon de ĝia loĝantaro, sidis en restoracioj aŭ en bulvardaj kafejoj aŭ ĝuis la vidindaĵojn. Omnibusoj transportis la kongresanojn (11. 5.) ĝis la grandioza justicpalaco, preterpasis la reĝan kastelon, bedaŭrinde sen la ŝanco de aŭdienco per la reĝa paro, kaj direktis la vojon al la aluminiakonstruaĵo Atomium. Oni promenis tra la triumfarko kaj admiris militmemorigan muzeon. Ĉie regis la dezirinda sunbela vetero. Eble tiu estis la kaŭzo, ke la varmkulturejo, kies vizito staris sur la programo, estis alloginta milojn da aliaj pacience atendantaj homoj anstataŭ nin.

Estis malfacile vekti la publikan intereson de tiu grandurbo. Kiel atendite, multloke regis ignoro kaj nescio. Ĉu la scivolemuloj komprenis la sencon de la defilado, kiu formiĝis la 14an kiel programpunkto „promenadorkestro en la antikva Bruselo“? Je la komenco la flago de la Belgaj Fervojoj, poste blovorkestro kaj malantaŭ ĝi la cetera kongresanaro — tiel ili marŝis tra la stratoj ĝis la Granda Placo. En la urbodomo okazis akcepto por la delegitoj. S-ino Van Leynseele, la skabeno pri arto kaj intelekto, donis aŭdiencon en sia luksa ĉambro. Fine montriĝis pozitiva reago de la urbo.

Muzikarto Balo Folkloro

La elektita tempo por koncerto en salonego eble ne estis tute konvena. Sed kion prezentis niaj muzikamantaj belgaj gekolegaj dimanĉon (10. 5.) posttagmeze, fakte estis ĝuo kaj meritas ĝeneralan estimon. En sia unua parto la programo antaŭvidis seriozajn kaj klasikajn muzikaĵojn de miksitaj orkestro, piano kaj kanto. Apartan lokon prenis la „kantantoj de la relo“, kiuj honore de siaj aŭskultantoj kuraĝis prezenti la Esperanto-himnon. Post la paŭzo la programeroj fariĝis iom pli nuntempaj. Pro la tondra aplaŭdo kelkaj prezentaĵoj estis ripetataj. IFEF-prezidanto De Jong direktis siajn sincerajn dankvortojn al ĉiuj kontribuintoj el la fervoja medio.

En la sama salono „Patria“, do ne en preĝejo, sekvis poste la diservo por la katolikaj kongresanoj celebrita de pastro Beckers, la ĝenerala prezidanto de la IKUE. En sia prediko li skizis la ligojn inter la kristanoj kaj la esperantistoj. La prediko en la internacia lingvo trece impresis.

Ankaŭ dimanĉon (10. 5.) vespere granda parto de la kongresanoj, ĉefe la junularo, kolektiĝis okaze de la internacia balo. Fakte temis pri dancvespero. Balo antaŭkondiĉas, ke ekz. la partoprenantoj ne venas en pluvvesto. Tamen la muzikistoj emfazis pri modernaj ritmoj kaj ankaŭ pri konvenaj por la pli aĝa generacio. La tvist-emuloj trovis sian kontentiĝon. Seriozaj estraranoj kaj komitatanoj demonstris, ke ili scipovas agi ankaŭ sur la pargedo. La sola manko estis la tro frua fino jam je la 22.30 horo.

La vicon de la kulturaj arangoj finis la junulara arta kaj folkloro festvespero (13. 5.). Sur la scenejo demonstris belga flagsvinggrupo sian kapablon kaj arton. Estis nefacila tasko manipuli unuope aŭ grupe la grandajn flagojn, tiel ke la rigardantoj ekkonu la sencon aŭ eĉ la enhavon de sinsekvaj scenoj. La demonstrado de historiaj eventoj akompanita de konvena muziko kaj — bedaŭrinde — nacia teksto postlasis fortajn impresojn. Sed kiu estis esperinta ĝui prezentaĵojn nur el la belga sfero, vidis siajn dezirojn nur parte plenumitaj. El Jugoslavio, la lando de vigla popoldancarto, estis veninta granda grupo. La specifa muziko, la popolkantoj kaj precipe la unikaj dancoj ravis ĉiujn kaj lasis forgesi, ke la kongresanoj troviĝis en Belgio. La grupo montris sian kapablecon kaj prezentis artiste siajn mondkonatajn dancojn en kolorriĉaj kostumoj. Spite al la granda aplaŭdo, kiun meritis la trupo sub la gvidado de s-ro Buha, estu permesate esprimi, ke estonte folkloro vespero aŭ demonstros specialaĵojn de la kongreslando aŭ prezentu internaciajn programerojn de pluraj kaj ne nur de du landoj. Dum la paŭzo LKK klopodis kovri la kostojn per loterio kun allogaj premioj dediĉitaj de la kongresanoj.

Per trajno kaj ŝipo al la Ardenoj

Al la programo apartenis du tuttagaj ekskursoj. La unua (12. 5.) komenciĝis per precize forveturanta speciala trajno. Post 1 1/2 hora veturado la kongresanoj estis en Dinant, tipe ardena urbetto apud la rivero Maas. Belega vetero favorigis la ekskurson. Sur la apuda rokego Bayard troviĝas citadelo, kiu estas konata kiel loko de akraj bataloj dum la unua mondmilito. Ni supreniris per kabinlifto. Mirinda estis la panoramo super rivero kaj urbo, sed tedis la atendado kaj vizito tra ĉiuj koridoroj de la citadelo. En unu ĉelo oni estis rekonstruinta la masakron inter germanaj kaj francaj soldatoj, en aliaj ĉeloj la vizitantoj trovis scenojn el la interna soldata vivo inkluzive la senkapigon de fuĝintaj soldatoj. Pli agrabla estis la komuna tag- kaj vespermanĝo en diversaj hoteloj. Estis sufiĉe da tempo por viziti laŭguste la proksiman groton aŭ por rigardi la panoramon de supre. Ĉiuj veturis posttagmeze per la ŝipo sur la rivero Maas ĝis Waulsort kaj reen. Tie oni devus ferii longtempe, kelkiu pensis rigardante la hotelojn en kampara beleco. Dum kelkaj horoj la esperantistoj estis okupintaj Dinant kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Neforgesebla estas i. a. la adiaŭa kanto de kelkdeko da knabinoj, kiuj hazarde ekskursis per la ŝipo kaj forlasis nin flirtante kaj ridetante.

Dua ekskurso kaj fermo

La ombro de la baldaŭa adiaŭo kuŝis sur la lasta tago. Ankoraŭfoje kondukis speciala trajno la jam limigitan kongresanaron ekster de la metropolo. Post mallonga veturado atendis aŭtobusoj en Landen. Unua halto en St. Truiden, unu el la plej malnovaj urboj en Belgio. Urbdomo kaj belfrido atestis pri pasintaj jarcentoj. Kelkaj sukcesis atingi ĝustatempe la konatan astronoman horloĝon, kiam la diversaj funkcioj je la 10a horo prezentigis. La regiono vaste etendiĝis kun siaj miloj da fruktoarboj. Baldaŭ oni rikoltos la ĉerizojn. Bobrijk estas la celo, kie ni tagmanĝis en impona halo. Aŭtomobila vagonaro invitis al rondveturado tra la naturo bele floranta. Tie oni estis rekonstruinta antikvan vilaĝon el la 17a jarcento kun originaj kampardomoj, vent- kaj oleomuelejo, bierfarejo, staloj, kie la gardistoj estis vestataj en kostumoj de tiu epoko. Vere la mipratro de la limburga regiono vivis — samkiel niaj antaŭuloj — en modestaj cirkonstancoj. Sed eble ili estis pli feliĉaj ol nia generacio. La omnibusveturado daŭrigis. La naturo fariĝis industria. Karbminejoj en Beringen, arma centro en Leopoldsborg kaj la atomcentro en Mol demonstris la nuntempon.

Vesperigis. La omnibusoj preterpasis la birdan naturrezervejon de Lichtaard kaj haltis antaŭ granda restoracio. La kongresanojn atendis laŭta muziko kaj diversaj artistoj, inter ili ges-roj Bobbejaan Schoepen, kredeble tre konataj en televido kaj radio. Iliaj klopodoj amzugi la publikon diverslingve kaj per gestoriĉaj scenoj estis tre estimindaj kaj efikis tondran aplaŭdon. Sed sub tio suferis la fermo, kiu devus aparteni tute al IFEF. Ankoraŭfoje la dancemuloj uzis la okazon de plaĉa muziko. De la artefarita proksima lago venis malvarmeta vento, kiam la omnibusoj transportis nin al la stacidomo de Herenthals. Tie atendis la speciala trajno por la reveturo al Bruselo. Bela tago finiĝis. Lastaj konversacioj en la kupeoj. Ridado, melankolio, ŝercoj — ĉiu sentis alie la lastajn komunajn horojn. LKK kaj multaj aliaj bone preparis tiun kongreson. Tutkore ni dankas al ili por ĉio. Estis unu el tiuj bonsukcesaj kongresoj, pri kiuj ni rememoros kun plezuro kaj danko. Ĝis revido venontjare en Norvegio!

W.B.

16. IFEF-Kongreso in Brüssel

Zum 16. Male nach dem Krieg veranstaltete der Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) seinen Kongress. In der Zeit vom 9. bis 15. Mai 1964 trafen sich in Brüssel aus 14 Ländern über 420 Eisenbahner-Esperantisten und ihre Angehörigen, darunter 60 Deutsche. Die Veranstaltungen wurden vom belgischen Landesverband vorbildlich ausgerichtet. Die Belgischen Staatsbahnen gaben nicht nur finanzielle und moralische Hilfe, sie stellten für die Kongressdauer auch Räume im Zentralbahnhof zur Verfügung.

Auf der Eröffnungsfeier richteten Delegierte von 14 Landesverbänden sowie Vertreter der Belgischen Staatsbahnen, der Gewerkschaften und anderer Organisationen Grußworte an die Kongresseteilnehmer. Der Präsident des Belgischen Esperanto-Bundes Jaumotte verglich in seiner Festrede die Besonderheiten des Eisenbahnerberufes mit den Zielen, die sich die Esperantisten setzen.

Vorstand (Exekutive) und Vertreter der Landesverbände (Legislative) beschäftigten sich eingehend mit organisatorischen Fragen, die sich aus den geänderten Statutenverhältnissen ergeben. In zwei öffentlichen Arbeitssitzungen wurden die Kongressvorschläge behandelt. Außer einer unumgänglich gewordenen Beitragserhöhung waren die Veränderungen im IFEF-Vorstand bedeutsam. Das langjährige Vorstandsmitglied Lok (Niederlande) schied endgültig aus. Den Posten des neugeschaffenen Vizepräsidenten übernahm Walder (Schweiz).

Die Schriftleiter der Landesorgane sowie die Beauftragten für das Fachwörtertum trafen sich in Sondersitzungen. Die bevorstehende Herausgabe eines **Fachwörterbuchs** durch den deutschen Landesverband löste wegen des angeblich geringen Umfangs eine gewisse Kritik aus. Auch die Jugend meldete in einer Sondersitzung ihren Wunsch nach einer Vertretung in der Legislative an. Die Kongreßteilnehmer bewiesen durch ihren regen Besuch und ihre Diskussionsbereitschaft, daß sie an der positiven Weiterentwicklung des internationalen Verbandes interessiert sind.

Einen Höhepunkt besonderer Art stellte die Fachvorlesung dar. Als nicht leichtes Thema hatten die Veranstalter die Anwendung der Elektronik bei der SNCB gewählt. Ein Auszug hierüber findet sich untenstehend.

Neben diesen offiziellen Veranstaltungen fehlte es nicht an solchen unterhaltender oder touristischer Art. Unsere belgischen Eisenbahner-Kollegen bewiesen in einem **Konzernachmittag** ihr musikalisches und chorisches Können. Flaggengruppen symbolisierten historische Begebenheiten meisterhaft. Eine große jugoslawische Volkstanzgruppe brachte südländisches Temperament zur

Geltung. Wer selbst tanzen wollte, hatte hierzu auf einem internationalen Ball Gelegenheit.

Die Stadt Brüssel ehrte den Kongreß durch einen **Empfang** der Delegierten im Rathaus, dessen eindrucksvolle Fassade einen Teil des berühmten Großen Platzes bildet. Die Teilnehmer des Kongresses, die durch Filme und eine ausgiebige Rundfahrt die Schönheiten der Metropole kennenlernten, fühlten sich von allem sehr beeindruckt.

Zwei **Ganztagesausflüge** erweiterten den Blick für die Vielfältigkeit der belgischen Landschaft. In den Ardennen wurde das aus dem ersten Weltkrieg bekannte Städtchen Dinant an der Maas mit seiner hochragenden Festung besucht und ein Schiffsausflug veranstaltet. Am letzten Kongreßtag lernte man die Schönheiten des Limburger Landes kennen. Wiederum begünstigte ein herrliches Maiwetter den Tag.

Viele Eindrücke wurden gewonnen. Die sonst so schwierige Verständigung löste sich sehr einfach, da hier eine Sprache praktiziert wurde: Esperanto. Dank den Veranstaltern und auf Wiedersehen im nächsten Jahr in Hamar (Norwegen)!

W. B.

Elektronik bei den Belgischen Staatsbahnen

Kurzfassung des auf dem 16. IFEF-Kongreß gehaltenen Fachvortrags

von Hendricks
Organisationsrat bei der SNCB

Die Anwendungsmöglichkeit der Elektronik im Dienste der Industrie und des Handels erweitern sich laufend. Auch die Belgischen Staatsbahnen bemühen sich, alle Möglichkeiten auszuschöpfen, die sich durch die neuesten Erfindungen auf dem Gebiet der Dioden und Transistoren anbieten. Diese vor 40 Jahren noch auf das Fernmeldewesen beschränkte Wissenschaft findet nunmehr Verwendung auch im Abfertigungs- und Verwaltungsdienst sowie bei der Abrechnung und im technischen Dienst. Zwei Beispiele mögen diese Entwicklung erläutern:

Der automatische Ablaufbetrieb im Zugbildungsbahnhof Ronet (bei Namur).

Das Stellwerk erhält mit Fernschreiber alle für die Wagenumstellung erforderlichen Angaben. Eine Ausfertigung ist in Klarschrift gehalten. Der andere Teil besteht aus einer Rolle mit gelochten Papierstreifen. Die Löcher sind nach einem bestimmten System geordnet. Eine mit dem Stellwerk für die Weichen und Signale verbundene Einrichtung übersetzt die verschlüsselten Zeichen und gibt sie als Aufträge an das Stellwerk weiter. Der automatische Ablaufbetrieb wird durch Betätigen eines Druckknopfes ausgelöst. Die Einrichtung läßt den jeweiligen Stand des Umstell-

vorgangs erkennen, da die vom Ablaufberg rollenden Güterwagen beim Überfahren isolierter Schienenstellen Kontakte auslösen.

Dieses System ist nicht starr. Durch entsprechende Betätigung der Druckknöpfe können im Programm Änderungen und neue Kombinationen vorgenommen werden.

Bearbeitung und Buchung der Frachtbriefe im Stückgutverkehr des Güterbahnhofs Brüssel TT.

Die Abfertigung erfolgt nach dem Kodeverfahren. Alle Angaben, die für die Abfertigung, die Frachtberechnung und die Abrechnung erforderlich sind, werden auf Lochkarten übernommen. Nach Durchlauf durch entsprechende Maschinen erscheinen die Ergebnisse für Versender und Abfertigung in Klarschrift. Alle Angaben für die Verbuchung und Statistik werden automatisch auf Karten aufgenommen. Sie dienen dem zehntägigen oder monatlichen Abschluß.

Dieses System erleichtert wesentlich den Tagesabschluß und trägt somit zur Beschleunigung des Abfertigungsdienstes bei. Es vereinfacht auch die Verbuchungen, während die Unterlagen vielfach verwendbar bleiben und keine Beeinträchtigung in der Lesbarkeit eintritt.

Weitere Anwendungsmöglichkeiten befinden sich im letzten Versuchsstadium oder werden in Kürze einsetzen. Einige seien genannt:

- das automatische Zugmeldeverfahren auf der Strecke Brüssel — Antwerpen und Lüttich — Herbesthal,
- die Fernsteuerung und Dauerüberwachung des

Zugförderungsdienstes auf der Strecke Lüttich — Herbesthal,

- die fernschriftliche Übermittlung von Angaben über die Zusammensetzung der Güterzüge, um das Umbilden auf den Verschiebebahnhöfen rationell zu gestalten und das rollende Material zweckmäßig einzusetzen.

Wir laden die Mitglieder und Freunde unserer Vereinigung herzlichst zu unserer diesjährigen Jahresversammlung ein, die am 17. und 18. Oktober 1964 in Solingen stattfindet. Einzelheiten folgen.

Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten

Der Vorstand

Aŭtomata konduktoro

En la halo de la subtera stacidomo Stamford Brook en la londona distrikta linio estas instalita aŭtomata barilo gvidata de elektrona cerbo. Tiu barilo ekipita per magneta biletdeĉifrililo estas kredeble la unua de sia speco en la fervoja trafiko. La pasaĝeroj metas sian biletan en malfermujon de la aparato. La elektrona instalaĵo altiras la biletan, deĉifras kaj tuj poste redonas ĝin. Se la bileto estas agnoskata kiel valida, lumigas la signo „Go“ (Iru), kaj la barilo malfermiĝas por la pasaĝero. Malvalidan biletan la aparato same redonas; sed lumigas la signo „stop“ (haltu), kaj la barilo restas fermita.

La elektrona kontrolaparato esploras nur biletojn por vojaĝoj tien kaj ren. Abonantoj kaj pasaĝeroj kun aliaj biletoj devas prezenti siajn biletojn kiel kutime al la kontrolisto ĉe la enirejo. Post finita vojaĝo la pasaĝeroj redonas la biletojn al la kontrolisto.

Nuntempe estas ekzamenata metodo, kiu permesos al la pasaĝeroj aĉeti abonantan biletan, kiun li povas eluzi tiel longe, ĝis kiam la sumo indikita sur la bileto estos elĉerpita.

(Traduk. el „Internationale Eisenbahnnachrichten“ de W. B.)

Laŭdo pri la fervojistoj

Mi mem uzas ja fervore la Federacian Fervojon, supozeble mi estas eĉ ĝia plej bona kliento. Veturante tra la landoj mi povas rimarki iom pri via laboro. Ĉu sabate aŭ dimanĉe, ĉu dumtage aŭ dumnokte: via servo ĉiam estas plenumata. La viroj kaj virinoj de la Federacia Fervoj ĉiuhore estas pretaj labori plene energie, ankaŭ se kelkiu festotago aŭ nokto estas perdita. Ili donas bonan ekzemplon, kiu meritas altan agnoskon. Certe tiu laborometodo estas kutima ankaŭ aliloke, sed ĉe la Federacia Fervoj ĝi estas plej evidenta.

Kion mi laŭdo ankoraŭ pri la Federacia Fervoj?

Unuflanke la ĉiam pli bonan ekipon de la veturiloj. Oni konstatare evidente, ke la porklienta servo daŭre pliboniĝas. Mi scias ankaŭ, kiom estas farita por pligrandigi la sekurecon de la Federacia Fervoj. Se vespere oni ekkuŝas en la fervojon, oni havas la konvinkon esti prizorgata. Tio estas afero kaj de la tekniko kaj de la homoj. Mia danko estas dediĉita al la sindono, al la lerteco kaj al la fideleco de ĉiuj fervojistoj.

(El alparolo de la federacia kanceliero Erhard antaŭ fervojistoj de la lokomotivejo Craillenheim farita la 17an. 4. 1964)

Ni legis en . . .

Bulteno de la aŭstria sekcio de IFEF pledas (en apr.) por la enkonduko de Esperanto per la germanlingva artikolo „Probleme unserer Zeit“.

DEFA-BULTENO de la Dana Esperantista Fervojista Asocio surprizigas (en apr.) per novelektita estraro kaj emfazas (en majo) diskuton pri la eksprezidanto.

EL POPOLA ĈINIO enhavas (en n-ro 2/64) kolorajn bildojn pri ĉinaj palacaj lanternoj kaj krizantemoj.

FERVOJISTO, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, detale priskribas (en apr.) la vidindaĵojn de la ekskurso al Belgio.

GEOGRAFIA REVUO, printempa eldono de 1963, ankoraŭfoje ilustras la grandiozan vojaĝon de la „karavano de amikeco“ tra Afriko.

HUNGARA FERVOJISTA MONDO fiere anoncas, ke la landa asocio de la hungaraj fervojistaj esperantistoj atingis la nombron de 803 membroj.

ITALA FERVOJISTO publikigas (en apr.) la funebran informon pri la forpaso de la vaste konata kolego Kavaliere Giuseppe Zaccani.

INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO, eldonata de la Societo por Internacia Lingvo substrekas (en n-ro 1/64) la ĝeneralan rifuzon de la homaro okupiĝi pri iu ajn mondlingvo. Tre rimarkinda estas „La laboro pri la publikaj rilatoj de Esperanto“.

La Fervojisto, organo de la franca IFEF-sekcio, apelacias (en apr.) al la ĵunularo defendi siajn rajtojn okaze de la statutrevizio.

La Socialisto reaperis post 30 jaroj kiel presita organo de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista. La temo de la germanlingva ĉefartikolo de la aprila eldono estas „Die sozialistische Internationale“.

NOVA CIVITO, la esperantigita katolika revuo, reliefigas (en n-ro 6/63) la paroladojn de la papo okaze de lia vojaĝo al la sankta lando.

En **Svisa Fervojisto** (apr.) troviĝas la protokolo pri la SAEF-jarkunveno en Lausanne, kie starigis la problemoj rezigni la pluan eldonadon de la asocia organo.

Synaly (Signaloj), organo de la pola fervojista sindikato, raportas (en febr.) naclingve pri la agado de la esperantistaj fervojistoj.

La fervoja trafiko pli kaj pli altigas la rapidecon. Nuntempe estas esplorata la rapideco de 200 km/h, kiu postulas specialajn sekurigajn instalaĵojn.

La firmao Siemens evoluigis en kunlaboro kun la Germana Federacia Fervojo novan sistemon, kiu nomiĝas „linia trajn-sekurigo“. Per ties helpo la fiksaj signaloj laŭlonge de la trako seninterrompe estas ligataj kun la veturanta trajno. Loko kaj distanco de la ĝisnunaj signaloj devas resti konservataj por la „malrapidaj“ trajnoj kun rapideco ĝis 140 km/h. La rapideco de 200 km/h kontraŭe bezonas bremsvojojn de 2500 metroj, tiel ke ĉiuj halto- aŭ malrapidosignaloj devas esti anoncataj en tiu distanco. Tiukaze trajno kun normala bremssefiko povas esti haltigata ĝustatempe antaŭ haltosignalo.

Verda lumo por 200 km/h

Koloraj lumsurfacoj estas instalitaj en la lokomotivstano bone observeblaj de la gvidisto. Ili anoncas la plejblan rapidecon preskribitan per la signaloj. Tri verdaj lumsurfacoj entenas la ciferojn 200, 180 kaj 140, du flavaj la ciferojn 60 kaj 40 kaj kroma lumsurfaco la ciferon 0. Tiuj indikiloj pri la rapideco ampleksas minimume la antaŭajn 2500 metrojn. Se ekzemple eklumas la verda cifero 200, la trajno povas veturi per tiu ekstrema rapideco minimume en tiu distanco. Se kontraŭe la indikilo montras la flavan ciferon 40, ekzemple antaŭ stacio, en kiu la trajno devos halti, restas al la lokomotivestro minimume 2500 m por bremsi nekre la trajnon ĝis 40 km/h.

En la momento, kiam la lokomotivo veturas preter signalo, la instalaĵo „antaŭpalpas“ novan trakoparton. La longeco de tiu parto estas diversa kiel la distanco inter la signaloj. Se ekzemple la distanco de la ĵus atingita signalo ĝis la sekvanta estas 2400 m kaj de tie ĝis la

postsekvanta signalo estas 3600 m, tiukaze la instalaĵo indikas la pozicion de la signalo 6000 m antaŭ la trajno. La plejbla rapideco indikita sur la lokomotivstano sekve validas por la celita distanco, kiu estas kontinue anoncata de mezurinstrumento.

„Bantoj“ elsendas impulsojn

Krom tio la instalaĵo kapablas eluzi ĉiam la mezuritajn indikojn kaj elkalkuli laŭ ili la rapidecon permesitan por ĉiu momento. Ĝi estas anoncata en la lokomotivstano samkiel la efektiva rapideco de la trajno. La linia trajnsekurigo bazas sur signalteknikaj principoj. Malfunkcio povas celi nur sekurigan agon. Ĝi povas konduki eventuale al nenecesa bremssefiko, sed neniam al malpermesita veturkomando. Linio kaj veturanta trajno estas ligataj per elektraj impulsoj. Ili estas elsendataj de bantoj el izolitaj kupraj tuboj, kiuj estas fiksataj laŭlonge de la reloĵ sur la tuta trako kaj efikas kiel sendantenoj. La lokomotivo portas iom super la reloĵ ricevilojn, de kiuj la impulsoj estas transprenataj kaj plukondukataj al elektronaj kalkulmezuriloj. La formo de la impulsoj dependas de la signalpozicio, de la celita distanco kaj de la plejbla permesita rapideco. Al la variaj impulsoformoj konformas la diversaj indikoj sur la lokomotivstano. La sistemo prezentas seninterrompan linisimilan indukton de la trako por la veturanta trajno, dum la konata sekuriga sistemo INDUSI bazas sur punktsimilaj induktoj. La sistemo INDUSI konservas sian gravecon por trajnoj kun rapideco ĝis 140 km/h.

(Kompil. el „Bundesbahn-Mitteilungen“ de W. B.)

Barcelona. *Zur Internationalen Handelsmesse, die vom 1. bis 15. Juni 1964 in Barcelona stattfand, versandte die Messeleitung auf ihre Kosten 15000 mehrfarbige Plakate mit Esperanto-Text ins Ausland.*

Bonn. Die Deutsche Gesellschaft für internationalen Jugendaustausch wird auch bei den diesjährigen Sommerlehrgängen (20. Juni bis 12. September) in Niederbreisig (Rhein) und im Schwarzwald Gelegenheit geben, durch geschulte Kräfte mit Esperanto vertraut zu werden. Es handelt sich um Einführungskurse, die sich jeweils über zwei Wochen erstrecken und an denen neben deutschen auch ausländische Jugendliche teilnehmen können. 1963 kamen Teilnehmer aus acht Ländern.

Essen. *Der Reisefernfabrplan und das Amtliche Kursbuch erhielten auch für den Sommerfabrplan 1964 Texte in Esperanto. Seit 1953 sind etwa 3,5 Millionen Fabrpläne mit Texteinlagen in Esperanto erschienen.*

Frankfurt. Wegen der großen Nachfrage wurde der Fernlehrgang für Esperanto neu aufgelegt. Er hat sich vor allem bei den Lernenden bewährt, die wegen dienstlicher Beanspruchung nicht in der Lage sind, an einem Anfängerlehrgang teilzunehmen. Anschrift: Briefschule GmbH, 6 Frankfurt (M), Untermainkai 66.

Gechingen. *Auch im Jahre 1965 wird der mehrfarbige Tierkalender (Auflage 1964: 35000 Stück) Texte in Esperanto erhalten. Da der Kalender von Banken und Sparkassen bestellt ist, wird er im allgemeinen nicht käuflich abgegeben. Falls jedoch bis September 1964 genügend Vorbestellungen eingehen, sind auch Einzelstücke käuflich zu erwerben. Der Preis einschl. Versandkosten beläuft sich auf DM 4,—. Anmeldungen erbeten an: Herr Staeger, Reinstieg-Verlag, 7261 Gechingen/Calw.*

Können üben schon beizeiten.

Der Fernlehrgang hilft vorbereiten.

PROSPEKTOJ DISKOJ FERIEJOJ

Kion serĉas eksterlandaj turistoj en Germanio, estas prefere romantikaj urbetoj. Al tiuj perloj, kiuj povis konservi sian mezepokan karakteron ĝis nia epoko, apartenas la urbeto Kronach (Kronah) en Nordbavario. Nun aldoniĝis al la urboprospekto ankaŭ la esperantigita teksto. Kiu ankoraŭ hezitas libertempi interne de la duoble ŝirmitaj stratejoj, turoj kaj dometoj, legu atente tiun prospekton majstre ilustritan per lignogravuroj kaj modele tradukitan de nia asocia membro A. Wollbacher, pro kies sukceso GEFA kore gratulas. La prospektaj estas senkoste haveblaj per „Städtisches Verkehrsamt, 864 Kronach“. Germanoj petu la prospektajn germanlingve.

En Hispanio komenciĝis la eldono de diskoj kun esperantigitaj kanzonoj. La unue aperinta enhavas repertuaron el la kataluna folkloro kaj la internacian universitan himnon „Gaudeamus igitur“ (Ĝoju ni). Mikrosulko je 45 r/m. Prezo: 20 steloj (6,— DM) plus sendkostoj. Adreso: Hispana Esperanto-Instituto, Str. Montcada 12, poŝtkesto 1073, **Barcelona (3)**, Hispanio.

La nombro de la somerumejoj por esperantistoj pligrandiĝis. En Jugoslavio estas bone konata Primošten sur la marbordo, proksima al Ŝibenik. Alia en Jugoslavio estas inaŭgurita la 31an de majo. Estas Bela Palanka, proksima al Niš, en la provinco

Orienta Serbio. Jam dum la antikva roma regado ĝi estis konata kiel arma stacio. Hodiaŭ tiu urbeto ofertas — laŭ propra aserto — ĉion, kion turistoj preferas: pitoreska naturo, banebleco, fiŝriĉa rivero kaj vigla Esperanto-grupo. Ekzemple estas la prezo por plena pensio en hotelo 1300 dinaroj kun rabato ekde la 10a tago. Informojn donas: Esperanto-Societo „Zamenhof“, **Bela Palanka**, Jugoslavio.

Postkongreso en Nederlando

Tuj post la IFEF-kongreso en Bruselo okazis en Amsterdam poskongreso (16.—18. 5.). Ni raportos detale en la venonta eldono.

El la grupoj

Duisburg-Wedau. Laŭ instigo de la fervojista grupo tri gazetoj publikigis artikolon pri „Esperanto en 6 feriejoj de DGFjA (germanlingva mallongigo por „Deutsche Gesellschaft für internationalen Jugendaustausch“). Vidu ankaŭ nian informon sub la rubriko „PANORAMA“. La gazeto „Neue Ruhr-Zeitung“ publikigis eĉ grandan artikolon pri la kontribuoj de esperantistaj fervojistoj sur la kampo de la internacia interkompreniĝo. — Kvarpersona familio el Anglio estis akceptata la 26an de majo. Ili restis unu semajnon.

Köln. Samideano Wilhelm Schuberth, unu el la pioniroj de la fervojista Esperanto-movado en Germanio, emeritiĝis la 1an de aprilo 1964. En n-ro 4/1960 nia

organo jam inde honoris lin germanlingve. La unua frazo de nia artikolo estas ankoraŭ aktuala: „Kiu ne konas lin, la altekreskintan viron kun la severa vizaĝo, kiu tenas en la mano la ŝatatan cigaron, kiu estas preta ĉiutempe por gajaj ŝercoj, kiu vizitas ĉiun IFEF-kongreson kaj ne mankas ĉe la GEFA-aranĝoj?“ Do, kvankam emeritulo, s-ano Schuberth espereble restos fidela aktivulo kiel 54 jarojn antaŭe. GEFA esprimas al sia altestimata membro sian dankon kaj deziras al li multajn jarojn en saneco kaj bonfarto.

Stuttgart. La komisiito pri Esperanto por la distrikto Stuttgart kolego Egon Kiefer estis invitinta al bone vizitita kunveno

en Laupheim-West. El la abunda programo meritas esti menciataj lumbildpreloj pri la pasinta IFEF-kongreso en Helsinko (Finnlando) kaj pri la fervojista Esperanto-movado. Samtempe oni preparolis la programon de la IFEF-kongreso en Bruselo (Belgio) kaj aliajn aranĝojn en Esperantujo. Kredeble la periodo de stagnado ŝajnas esti superita.

Anoncoj

Franca Fervojista Esperanto-Asocio (FFEA) disponas pri propra porjunulara koresponda servo. Interesuloj skribu detalojn pri la propra persono kaj la koresponddeziro aldonante du respondukuponojn. Adreso: Franca Fervojista Esperanto-Asocio, junulara koresponda servo, 11, rue de Milan, **Paris 9e**, Francio.

Korespondadon kun germanaj fervojistaj deziras: — Fervojista Esperantogrupo „Por mondpaĉo“, Toldi u 23 o, **Nyiregnyháza**, Hungario — Zdeněk Česenek, Cervenc Kostelec — **Stoltn** / okres Nachod / Ĉeĥoslovakio.

La stoko de la konataj reklamiloj „Tra Germanio per la Federacia Fervojoj“ malpligrandiĝas. Demandu ilin por viaj eksterlandaj geamikoj per la redakcia adreso. Represo petata.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.